



N.E.L.E. (Nia Estas La Estonteco)
 Flandra Esperantista Grupo
 Ejo * Breughel *
 Elm. Jacquainlaan, 37, Brussel (Belg.)

Officieel Orgaan
 van den

Vlaamschen
 Esperantisten -
 Bond



Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

La Viro el Francujo — Ivans	29,—	bind
Gösta Berling — S. Lagerlöf	55,—	»
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,—	»
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,—	»
Si — H. Rider Haggard	29,—	»
Petrolo, vol. 1 — U. Sinclair	29,—	»
Petrolo, vol. 2 — U. Sinclair	29,—	»
Luno de Izrael	29,—	»
La Dormanto Vekiĝas	29,—	»
Pallietier — F. Timmermans	28,—	»
La Leono de Flandrujo — H. Conscience	32,—	»
Tra la Labirinto de la Gramatiko	40,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50	broŝ.
La Du Amatinoj — de Musset	7,50	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,—	»
La Homaj rasoj de la Mondo	24,—	»
Kudlago, la malgranda eskimo	5,—	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,—	»
Stranga Butiko. — R. Schwartz	10,—	»
Maria kaj la Grupo. (L.M.-Libro)	22,—	»
Konversacia Literaturo (Cseh-metoda)	12,—	»
Fundamenta Krestomatio — Zamenhof	20,—	»
Nieuw Leerboek (geïllustreerd)	12,—	»
Examenopgaven	10,—	»
Muusses E-Biblioteko (10 volumetoj)	41,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterrijck	5,—	»
Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden)	2,50	»
Schidlof Zakwoordenboek	25,—	bind
Groot Woordenboek Van Straaten	80,—	bind
Beknopt Woordenboek Van Straaten	40,—	bind
Plena Vortaro de Esperanto	84,—	bind
Flandra Esper. 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,—	broŝ.
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1)	10,—	»
INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.		
Verda stelo, sur blanka fono: 3.— fr.		
Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.		
Flandra kaj Esperanta flagetoj: 5.— fr.		
Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1.— fr.		
Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3.— fr.		
Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.		

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:

A. Pittoors

Ten Eeckhovelei, 125

Deurne-Noord

Antwerpen



Administranto:

Adolf De Keyzer

P. vanHumbeekstr., 3

Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj

Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.

Eksterlando: 6 belgoj

Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.



Dr. L. L. ZAMENHOF (1859-1917)

Cirkau Jubileo

Jen la centa numero de nia « Flandra Esperantisto » ! Ne estas hazardo ke mi diras « nia ». Ĝi estas duoble « nia ». Ĉar ĝi estas la revuo de ĉiuj Flandroj, kiuj helpis ĝin, viviĝis ĝin, subtenis ĝin, skribante, donacante, abonante. Kaj plie ĉar la « Flandra Esperantisto » estas kreitaĵo de la « Flandrema Grupo Esperantista ». Kaj kiel prezidanto de tiu grupo mi preskaŭ volus diri « mia ».

Estas gloro por nia « Flandrema » ke ĝi blovis la animon en revuon vivindan dum cent numeroj. Estas ja neordinara facto inter la esperantista gazetaro ke revuo monata aperas *seninterompe* dum naŭ jaroj por brile atingi cent-numeroj-aĝon. Pli grandaj revuoj mortis dum infaneco sed nia « Flandra Esperantisto » !...

La brilo tamen ne gloras per la revuo sed per la homoj kiuj ĝin, kreis kaj subtenis. Mi pensas kun emocio admira al la instiganto, la iniciatoro laŭ la vorto kiun preferis nia Majstro, al nia Jan Van Schoor. Li prenis sur sin la timigan taskon krei revuon, ne sciante la sorton de sia kreitaĵo, ne konante la zorgojn, kiujn ĝi postulus, nek la penojn, kiujn ĝi kunportus. Sed kun venkpreta optimismo nia Jan (li lasu al mi la favoron de tiu intima nomo) komencis kaj daŭrigis. Li estis la viviga animo dum la plej malfacilaj jaroj, la unuaj. Kaj kvankam la nombro de la abonantoj deponis tiu tempo kreskis, kaj kvankam la revua kaso pli prosperas, neniu riskus diri ke tiuj unuaj jaroj estis la malplej interesaj. La merito de nia Jan estas des pli granda ! Estas nur domaĝe ke la jubileo de nia revuo ankaŭ ne estas la redaktora jubileo de nia Jan. Mi konfesas ke estas io granda en la fakto labori nur ĝis kiam tiu laboro iĝas pli facila, kaj tiam ĝin forlasi, eble por trovi novan, pli fortstrecigan, pli rilatan al la fortoj sentitaj en si. Tamen kiu havus pli da rajto vidi la sukcesojn, de l' bubo, ol tiu kiu ĝin naskis kaj vartis dum la infanaĝo ?

Post la Jan aro da redaktoroj eminenta prizorgis la revuon. Ĉiu laŭ siaj propaj fortoj, intencoj, vidpunktoj : kaj refortiga estas la konstato ke ĉiuj nur atentis pri pli bela evoluo de la bele komencita laboro. Mi ne citos iliajn nomojn, ili estas sufiĉe konataj. Mi nur gratulu S-ron Pittoors, nia hodiaŭa redaktoro, pro la kuraĝo, kiu lin instigis preni sur sin la dolĉ-amaran respondecon de la redakcio en tempoj kiam nia revuo trapasis danĝeran krizon... espereble nur por konformiĝi al modoj nuntempaj.

La « Flandra Ligo Esperantista » oficiala posedanto nuna de nia revuo, ĝojas pro la centa numero. Kaj la « Flandrema Grupo Esperantista » ĝojas ankaŭ, ĉar ĝi laŭforte kunhelpis al tiu triumfo. Ambaŭ ĝojante egalmerite, ili ambaŭ ĝojas egalplenkore.

Tamen ni preĝu por ke tiu ĝojo ne nasku fieran blindecon Feliĉege la jaro estas riĉa je okazoj por lerni humilecon. Ĉar se tiu jaro vidas nian centan numeron, se ĝi estas la kvindeka de Esperanto, ĝi ankaŭ estas la dudeka de la morto de nia Majstro. Kaj ĝuste dum nia jubileo estas utile pripensi iom tiun ĉi alian datrevenon, ĉar ni povas ĉerpi plenmane el ĝi la plej utilajn kaj plej belajn lecionojn. Ĉar vere ni ne povas honorĝi la memoron de nia Majstro per laŭdaj artikoloj, kiuj nur ofendus lian ekzemplan modestecon ; ni

nur komprenu la lecionojn, donitajn de Li : kaj mi estas certa ke tio Lin pleje plaĉus.

* * *

Kaj certe ne estos ni, kiuj lernos al Li idealismon. Ja tro multe da Esperantistoj vidas en Esperanto nur nepopolaĉa ludo, logika formulo, lingva akrobataĵo. Ili ne plu komprenas ke Esperanto estas io pli. Kiel de Beaufront : « nur lingvo ». Ili forgesis la radikon « esper' » ĉar ili ne plu scias kion esperi. Ne plu la sama bela idealo puŝas nin, ne plu la sama sankta konvinko. Ĉu vere do la interna ideo mortis kun la Majstro ?

Mi scias : ni estas praktikuloj, ni nur amas ciferojn, rezultatojn. Malestimo de l' idealo estas moderna malsano, modo. Kion mi diras ! Ne ! estas supera ŝtupo de pli alta civilizacio, pli forta grado de homa klereco, dezirinda stato de plej scienca vivkompreno. Faktoj!... Kaj intertempe ni forgesas ke ĉiuj tiuj allogaj ciferoj, notantaj same allogajn venkojn, nur estas la rezulto de la penado de l' idealistoj pasintaj ; ke radikigas *niaj* triumfoj en la bazo, kiun *ili* fortikigis. Kaj tamen tiuj falsaj sukcesoj nin blindigis tiel, ke ni finfine kredis sincere ke ni ion faris.

Sed ĉu ni havus la necesan forton por semi, sciante ke ni ne rikoltus ? Tamen tion faris nia Majstro. Konscie. « Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, ni semas kaj semas konstante ». Por tiel agi oni bezonas superajn fortojn, ĉerpeblaj nur el supera ideo, supera idealo. Tia idealo estas la sola kondiĉo, sub kia estas permesata al la homo rememori sian dian devenon kaj donaci al siaj inspiritaĵoj la eternecon, kiun li mem malhavas. Tiam kondiĉon plenumis nia Majstro : kaj post lia morto, vivas Esperanto.

En la mondon venis nova sento,

Tra la mondo iris forta voko.

* * *

Ne sufiĉas idealo, necesas labori pro la idealo. Ni nur laboras pri ĝi. Konsekvence ni ne sufiĉe penadas ; ni ja mankas la necesan forton, la kredon : forgesante esperi, ni forgesis labori.

Mi scias : ni estas praktikuloj, ni nur amas ciferojn, rezultatojn. Sed la vojo al tiuj rezultatoj, la laboro, estas al ni nekonata. Praktikeco. Komerca spirito. Industrio. Maŝinoj !... La maŝinoj laboras por ni, fizike kaj intelekte, kaj alportas al ni rezultatojn tutpretajn. Atendante ni parolas pri ĉiuj aĵoj fareblaj, ni eĉ revas pri ili kaj pro tio sentas nin eĉ grandaj idealistoj. Kaj ni estas konvinkigataj ke tiu kvalito nin maldevigas ion fari. Tutplie ni laŭte certigas ke ni akre laboras spirite...

Ne, idealoj ne malhelpas laboron. Estas denove nia Majstro kiu lernas nin. Laborante li ekfaris Esperanton, laborante Li ĝin diskonigis laborante Li ĝin vivtenis. Kelkaj tagoj antaŭ Lia morto Li sin sentis ankoraŭ sufiĉe forta kaj kredis tiel neskueble en la venko de l' laboro, ke Li komencis redakti novan vortaron. Ĉu vi demandas pli solenan pruvon de idealismo kaj laborpovo ? Se ĉiuj Esperantistoj, nuntempe sufiĉe multnombraj, havus la laborkuraĝon de nia Majstro !...

Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

* * *

Ne sufiĉas idealo, ne sufiĉas laboro, necesas ame labori pro la idealo. Dum malhoma milito Zamenhof mortis pro kormalsano. Li amis, kaj tro longa fratbuĉado ĝismorte turmentis lian koron. En la vivo de nia Majstro estas tiu detalo por mi plej emociiga. Homo, kiu tiom amis kiom Li ne povis morti alimaniere. Mi ne volas kredi ke tio estus nura hazardo, kvankam mi scias ke ni estas praktikuloj, amantaj nur ciferojn, rezultatojn. Ni eĉ ne *amas* ilin, ĉar ni nur ŝatas ilin por ili mem kaj ne por ilia enhavo. Kolekti rezultatojn. Statistiko ! Kiam la maŝinoj ne laboras por ni, ni laboras kiel maŝinoj, slipsisteme, malvarme. Ni laboras per la manoj, ni laboras per la kapo, neniam per la koro. Ĝi estas obstine maldolĉigata per amerikana rideto, seritipa. Kaj tamen amon diras Esperanto, amon ĝia naskiĝo, amon ĝia evolucio, amon ĝia ideo. La resumo de nia movado estas amo, la granda helpilo por atingi la celon :

Sed dissaltos la obstinaj baroj
Per la sankta amo disbatitaj.

* * *

Ho radika peko de nura praktikeco ! kiel abomena vi devas esti kiam nia dolĉa Majstro preskaŭ ekkoleriĝis dum kongreso parolado : « Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan ! ». Kompreniĝas : Li amis sian aferon, kaj pro tio Li laboris por ĝi, kaj pro tio li esperis de ĝi "efektivigo de la bela sonĝo de l' homaro. Li estis ame laboranta idealisto.

Feliĉege estas konstatebla, ke ekzistas ankoraŭ Flandraj Esperantistoj kiuj amas, esperas kaj laboras. Kaj la aliaj ankaŭ ne estas malbonaj : ili ne *estas* modernaj homoj, ili nur havas modernajn kutimojn. Ni lasu tiujn kutimojn kaj precipe nun, dum laceco, ni turnu la okulojn al la Majstro por demandi al Li la necesan forton por esti kiel Li kaj sekvi la de Li donitajn ekzemplojn. Se ni agas tiel, estos asekurataj por « Flandra Esperantisto » multaj ĝojaj jubileoj, kaj post longa vico de centaj numeroj la tiamaĵ legantoj de nia revuo diros pri ni « Ili estis veraj Esperantistoj ». Estas la nura valora laŭdo. Kaj la Majstro estos kontenta.

D-ro Edgard VERHEYDEN.

Nia Laborplano


Nuntempe estas kutimo starigi planojn por atingi difinitan celon en ia difinita tempo. Kia organizaĵo ne posedas sian kvinjarplanon ? Kial ni ne havu ? Sed, ni ja havas ! Jes, ni havas kvinjarplanon. Kelkaj ligoj sendube miras, ĉar ĝis nun ili ne aŭdis pri io simila en « F.L.E. ». Tio estas kompreneble ĉar la estraro ne brue anoncis ĝin sed trankvile kaj tamen celkonscie eklaboris al ĝia efektiviĝo.

En 1935 « Flandra Ligo Esperantista » tute ne prosperis : la anaro malrapide sed nehaltigeble malkreskis kaj la organiza strukturo de la ligo estis tre malforta. Nur la liga organo kaj la plejofte senanimaj ligkunvenoj estis la nuraj ligiloj inter la malmultaj « aliĝintaj grupoj » kiuj konsistigis « F.L.E. ». Krome nia instituto, sen propraj eldonoj, povis malmulte helpi al la movado kaj la financaj malfacilaĵoj de « F.E. » estis daŭre minacanta fantomo.

Por eviti katastrofon evidentiĝis ke radikala ŝanĝo urĝe necesis. Tion komprenis la estraro kiu sur la kampoj organiza kaj propa- ganda decidis surpaŝi alian vojon.

Pasis du jaroj kaj ni povas konstati ke niaj projektoj normale kaj tre kontentige efektiviĝas. Kresko de pli al 100% de la sekcioj kaj de la anaro kaj kompleta financa sano konvinke montras ke la vojo elektita estas la taŭga.

Sed ni parolis pri kvinjarplano, komencita en 1935 ĝi do finiĝos en 1940. Kia devas esti la celo tiam atingita ? Unue : *laŭkvante* forta organizaĵo t. e. sekcioj de « F. L. E. » en ĉiu urbo kaj granda vilaĝo de Flandrujo ; due : *strukture* forta organizaĵo t. e. organizaĵo sur ĉiuj kampoj bone ekipita por gvidi intensan esperantan vivon.



Le ĉefestraro de F. L. E.

Por efektiviĝi la unuan punkton (*laŭkvante* forta organizaĵo) ni devas en niaj respektivaj regionoj helpi laŭ nia povo al la Kursa Centro de « F. L. E. » kiu grandskale organizas kursseriojn. Por ebligi la duan punkton (*strukture* forta organizaĵo) necesas ke la plej fervoraj, la plej kapablaj ligoj sin laborprete metu je la servo de la *ligo*, kiu bezonegas kompetentajn samideanojn por okupi funkciojn en la starigotaj servoj : gazetara, radia, ekzamina, k. a.

La ligo konsistas el la estraro, la *servoj*, la sekcioj. Ĉiu servo havas difinitan taskon kiu celas ĉu la internan vivon de la ligo, ĉu la propagandon, ĉu ambaŭ. En la ligo jam ekzistas la servoj : instituto, organo, kursa centro, ekspozicio, grupkonsilo. Kelkaj efike funkcias, aliaj ĵus fondiĝis kaj necesas atendi la rezultojn sed nepre necesos kompletigi la serion per la suprecilitaj. Tiucele ni atendas laborpretajn samideanojn kaj la estraro ne hezitos inviti la plej aktivajn agemulojn el la sekcioj por okupi la funkciojn en la servaro de la ligo. Ni ne forgesu ke la sekcioj estas i. a. ankaŭ la liverantoj de estraroj kaj gvidantoj por la landa organizaĵo.

Se la sekcioj daŭre laboras por pliperfektigi siajn anojn, se ili konstante propagandas, regule organizas kursojn aŭ helpas je la organizado de kursoj en apudaj lokoj, organizas ekspoziciojn kaj propagandajn vesperojn, akurate agas laŭ la indikoj de la ligestraro, konsciencie plenumas la taskon de perantoj inter la ligo kaj la anoj, regule sin reprezentigas en la ligkunvenoj kaj ĉiel plifortigas la *ligan* spiriton kiu devus animi ĉiujn anojn de nia landa asocio, ni ne dubas pri la sukceso de nia kvinjarplano, kiu havigos al ni organizaĵojn kapabla prilabori la finvenkon de Esperanto en Flandrujo !

H. R.

Esperantisto Ĝismorte Fidela

Tiu-ĉi honoran titolon sen ia dubo meritas nia bedaŭrata amiko JUUL KARNAS. La Flandra Esperantista Movado ŝuldas multan dankon al Li kaj precipe la organo : Flandra Esperantisto.

Tro frue — li naskiĝis la 5-an de Februaro 1902-a — kruela malsano, la ftizo, trenis lin for el la vivo. Li mortis, post longa suferado la 20-an de Februaro 1935-a.

Depost sia dekoka jaro li apartenis al la plej fervoraj Esperantistoj. Profesia instruisto, estis al li facile instrui nian karan lingvon kaj li estis konvinkita ke « Esperanto en la lernejon » devus esti la ĉefa batalkrio de la Esperantistaro. La faktoj pravigis lin, ĉar la jubilea kongreso en Varsovio kaj la Pariza Konferenco okazis sub tiu-ĉi devizo. Ne mirige estis ke li en 1924-a aliĝis al la ĵus fondita « Antverpena Poresperanta Propaganda Komitato », kiu laboris en tiu direkto. Kaj baldaŭ li estis inter la unuaj instruistoj, kiuj gvidis vesperkursojn en la urbaj lernejoj. La individuaj membroj de A. P. P. K. formis grupon, « La Reĝia Vojo », kies prezidanto estis Li, kaj restis ĝis la fino de sia vivo.

Malgraŭ malforta sano, li ĉiam estis gaja, sprita, bonhumora kaj optimisma ; do ĉiajn bonajn ecojn, kiujn bezonas arda propagandisto, li posedis. Li estis poeto kaj aktoro. Amason da flandraj kantoj li esperantigis. Krome multaj originalaj versaĵoj fluis el lia plumo. Li kunmetis en 1930-a la konatan « Esperantista Kantaro ». Pli ol unufoje li gajnis premion el la ĉiujara konkurso de la hispanaj « Floraj Ludoj ». Kiel aktoro ni povis admiri lin en la rolo de la subpremata frato en la unuakta teatraĵo « Bietje » de Cornette.

Kaj la unua kongreso de la flandraj Esperantistoj en 1930-a en Antverpeno, kies prezidanto li estis, bone sukcesis. La 10-a kongreso, la jubilea, okazos en 1939-a en la sama urbo. Sendube, pilgrimado al lia tombo estos programo de la 10-a !

En la jaro 1934-a nia organo bezonis novan redaktoron. Kuraĝe li prenis sur sin la pezan laboron. Feliĉe lin helpis fervore kelkaj samideanoj, inter kiuj S-ro Van Durme. Sed post unu monato li, por la dua fojo jam devis vojaĝi al Svislando pro sia malsano. Sed li daŭrigis sian taskon ! Por la unuaj du monatoj la ĉefartikolojn jam estis pretaj ! Kaj el Svislando li skribis leterojn pri la tiea vivo, verkis kaj tradukis versojn, kuraĝigis nin en la redakcia laboro, kiun nun portis niaj ŝultroj, ĝis kiam ni ricevis leteron... flandre skribitan... la komenco de la fino...

NENIU LINGVO
sen literaturo. Plej trafe
prezentas al vi nian litera-
turon la revuo
LITERATURA MONDO
Luksa aspekto, ilustrita.
Abono : 65 Fr.

LINGVO-LIBRO
informas vin pri ĉiu okazo
en nia literaturo. Abonu ĝin
kune kun viaj amikoj.
Abonprezo (tri ekz. kune)
8 fr.

kvaronjara aldono al Lit.
Mondo.

Abonojn akceptas kaj spe-
cimenojn sendas :

Flandra Esperanto-Instituto

Magdalenast., 29, Kortrijk (p.k. 326851)



*La Mo-libroj plej diversaj,
Verkaj porokaj, verkoj veraj
Atendadas, ke legante
Vi, pin, distruu, elegante.
Ĉiu libro: trezoreto
Kaj, ornami, de libro-ĉeto.*

Ni, kiuj lin ofte observadis, ne miris pri tio. Adiaŭante lin ĉe lia
dua forvojaĝo al Svislando, ni antaŭsentis, ke ni ne plu vidos lin.
Niaj lipoj diris : « Ĝis revido », nia koro ploris pro bonvola mensogo.

Li mortis en Lausanne. Kelkaj flandraj samideanoj transportis lian
kadavron al Antverpeno. Granda amaso de samideanoj ĉeestis la
enterigon en Berchem.

Li fosis sian sulkon. Li semis konstante.

Ĉiu Esperantisto el Flandrujo alportis sian ŝtoneton kaj post
kelkaj monatoj ni povis inaŭguri belan tombostonom, sur kies
supraĵo estas enĉizita lia tuta biografio en tri vortoj : ESPERAN-
TISTO GISMORTE FIDELA ».

A. LODEMA.

La Kongresmonato

Aŭgusto estas por la internaciaj E-organizoj la kongresmonato.

Por festi la 50-jaran ekziston de Esperanto la neŭtralaj Esperan-
tistoj kongresis en Varŝavo, la urbo kie Zamenhof pasigis plej gran-
dan parton de sia vivo. Ĉeestis la kongreson 1.200 samideanoj el 30
landoj. Estis oficiale reprezentataj la registaroj de Aŭstrio, Suda
Aŭstralio, Belgujo, Bulgarujo, Estonio, Finnlando, Liechtenstein;
Nederlando, Norvegujo kaj Papuo ; saluttelegramon sendis, nome de
la hispana popolo, la kataluna registaro. Okazis vizito al la tombo
de Zamenhof kaj pilgrimo al la naskiĝurbo de la Majstro. Sur la
kongresprogramo troviĝis multaj fakkunsidoj ; pro organizaj man-
koj kelkaj tamen ne okazis. Laborkunsidis U. E. A. kaj I. E. L.

sed ĉiuj klopodoj por reunuigi la Esperanto-movadon restis senfruktaj : sekvontan jaron U. E. A. kongresos en Berno kaj I. E. L. en Londono... Malgraŭ kelkaj brile sukcesintaj programoj — i. k. estas speciale menciinda altnivela literatura vespero — la kongreso estis pli funebra ol jubilea.

La 17-a kongreso de la laborista esperantista organizo « Sennacieca Asocio Tutmonda » (S.A.T.) okazis de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto en Roterdamo. Partoprenis tiun kongreson 806 Esperantistoj el 16 landoj. La kongreso konfirmis la principojn sur kiuj estas bazitaj S. A. T., nome : individua membreco, superpartieca karaktero, sennacieca strukturo. La raportoj de la plenum-komitato trovis unuaniman aprobon ; la debato pri ili, same pri la organizaĵaj problemoj okazis en plena harmonio kaj frateca atmosfero. Tiuj debatoj plenigis kvar laborkunsidojn ; dum ili paroladis membroj el multaj regionoj eĉ el landoj, el kiuj vizito estis apenaŭ atendebla. Interfratiĝvesperon ĉeestis pli ol 1.300 personoj, same la solena malfermo unuigis preskaŭ la saman nombron. La urbestro akceptis la kongresanojn ĉe la urba domo, kie okazis pluraj alparoloj kaj regalo. Por subteni la «lukton de la hispana popolo » estis kolektitaj proksimume 100 guldenoj. La venontjara S. A. T.-kongreso okazos en Bruselo.

La 19-a kongreso de Internacia Katolika Unio Esperantista (I. K. U. E.) okazis en Hago. Ĝin partoprenis 400-500 Esperantistoj. La ĉefajn kunidojn ĉeestis eminentaj personoj de la nederlanda katolika vivo. Unu el la menciindaj aranĝoj estis la E-prezentado de la biblia teatraĵo « Jozef en Dotan » de Vondel. Oficiale akceptis kaj esperantlingve bonvensalutis la kongresanojn, urbestro S-ro de Monchy kiu mem estas Esperantisto. La sekvonta I. K. U. E.-kongreso okazos en Bled aŭ Ljubljana (Jugoslavio).

La 3-a kongreso de « Internacio de Proletaj Esperantistoj » (I. P. E.) okazis en Parizo. Dum la kunvenoj oni pritraktis proponjn pri la unuigo de la laborista E-movado. La kongreso decidis translokigi la I. P. E.-centron al Londono kaj la organon « Sur Posteno » al Belgujo. Sendis salutojn el Hispanujo generalo Mangada kaj verkisto L. Renn. En Barcelono okazos la 4-a I. P. E.-kongreso.

Kompilis : ECO.

Vlamingen, leert.... ESPERANTO

Zoo luidde de oproep in de maand Juli 1929 bij het verschijnen van het eerste nummer van Flandra Esperantisto.

Vlamingen, leert Esperanto de taal van den vrede, zoo las ik op een der spandoeken gehangen aan de gevel van een woning te Diksmuide, ter gelegenheid der jongste Yzerbedevaart, en dit voor oogen van meer dan honderd duizend Vlamingen. Het lezen van die enkele woorden deed mij het besluit nemen dien wekroep te herhalen bij het verschijnen van ons honderdste nummer.

Vlaamsche Esperantisten hebt U reeds goed nagedacht welk een duchtig wapen Esperanto worden kan bij den bevrijdingskamp van ons Vlaamsche volk .

Bij het propageeren onder uw vrienden en kennissen, hebt U er wel genoegzaam op gewezen dat de Wereldhulptaal Esperanto zich verbreidt over de heele aarde, en aanhangers telt in alle steden der wereld, dat dus voor den Esperantist de wereld openstaat. Dat Esperanto zij, de tweede taal voor allen, met einddoel dat, tegenover landgenooten de moedertaal, en tegenover vreemdelingen, van welke natie ze ook wezen, Esperanto gebruikt worde. Dat alleen brenge de eenvoudige maar ideale oplossing van het vraagstuk der internationale taalverwarring, die vrede, welvaart, handel en verkeer zoo ernstig belemmert.

Vlaamsche Esperantisten, zegt ook aan uw vrienden en kennissen, dat wij intusschen door onderlinge organisatie reeds alle taalmoelijkheden uit den weg ruimden, dat wij correspondeeren in één taal met de geheele wereld, en dat ieder land zijn Esperantovereenigingen en Esperantobladen heeft.

Dat bijna alle radiostations uitzenden in Esperanto, dat de telegraafunie Esperanto als internationale telegraaftaal heeft erkend, dat het internationaal arbeidssecretariaat mededeelingen uitgeeft in Esperanto, en door vele internationale organisaties Esperanto op hun congressen wordt gebruikt. De tijd is niet meer verre af, dat men zich zal afvragen : Hoe heeft een moderne wereld zoolang zonder een gemeenschappelijke hulptaal kunnen stellen ?

Het Esperanto dat door Dr Zamenhof werd samengesteld, bestaat uit de meest geschikte bestanddeelen der bestaande talen. Weet U dat het aantal talen dat over de geheele wereld werd gesproken \pm 2000 bedraagt, dat dit evenveel struikelblokken zijn die de internationale toenadering in de weg staan, en de wereldhulptaal Esperanto niet tegenover de nationale talen staat, maar integendeel de moedertaal beschermt, vooral van kleine naties tegen verdrukking en vernedering. Esperanto wil uitsluitend gebruikt worden voor internationale doeleinden, Esperanto is dus wel degelijk de taal van den vrede, en den eisch van den tegenwoordigen tijd.

Vlaamsche Esperantisten, gij die dus Esperanto kent, de taal leest, spreekt en schrijft, maar niet zijt aangesloten bij onzen landelijken bond, uwe plaats is in onze rangen, sluit aan bij den Vlaamschen Esperantisten Bond, die reeds over heel Vlaanderen zijn vertakkingen heeft, en met zijn orgaan « Flandra Esperantisto », in alle vlaamsche middens, en ook in 't buitenland tracht door te dringen. Maakt propaganda voor Esperanto onder uwe Vlaamsche vrienden, laat hun dit schrijven lezen, leert hun ook nog dit geduchte wapen hanteeren tegen de Brusselsche centralistische politiekers, die niets meer vreezen dan de bekendmakingen van de verzuchtingen der Vlamingen in het buitenland. Vlamingen, wordt terug wereldburgers, leert Esperanto !

A.D.K.

MEMIM.....

Kompreneble, via legantina Moŝto, vi ne konas mian amikon. Sed vi deziras prisciĝi lin. Tamen, kial perturbi lian ripozon, kial profani la solecon kiun loĝatigas nur fantomoj karaj, kantoj birdaj kaj la kuraca spiro de P' naturo. Kial... Silenti, nepre silenti estus la devo. Sed fraŭline lerta vi estas : foje anekdotinté pri li, mia lango eniĝis en la radaro de via kuriozeco, kaj eliri, dio mia, estas alia afero.

Mi konfesas, nur homoj malmultaj vidis lin, meditis kun li, aŭskultis lin parolanta ; bedaŭrinde, ĉar prudentaj estas liaj konsiloj kaj strange profetaj kelkfoje liaj vortoj. Mi estas do ŝanculo koni lin, sed malŝanculo koni vin... Tia entrudemo. Ne, mi tute ne posedas foton. Kiel, fizike, li aspektas ? Mi timas ke seniluzio estos lia portreto ; mi tamen skizos ĝin, ekzemple por puni vin.

Mi memoras lin staranta meze de kampara vojeto postrevanta alaŭdon kiu al suno flugas. Sufiĉe dika, ne tre alta laŭ staturon. Ordinare neglekte vestita. Liajn harojn, preskaŭ flavajn kiel spikoj, idea uragano senordigas. La brovoj, neegalaj kiel la okuloj. Ties blueco hela naivigas liajn rigardojn. Iomete li strabas ; iomete nur : ne tro atentante, oni ne rimarkas tiun malperfektajn. La nazo tre malgranda, larĝa. La buŝo, pro delikataj lipoj, neatendita... En tia kazo, tamen funkcias ekvilibra menso.

Sur alia planedo, eble li estus ĉiutaga sed ie en Flandrujo. Vidinte lin traŝan verdikton eĉ nevole vi murmurus : « Homaĉo. Bedaŭrinda vizaĝo ». Jes, sendube. Sed via opinio, kara fraŭlino, ne ĝenos lin, ĉar unue li ne aŭdos ĝin kaj due l'inan genton li malŝatas. Eble tial mi estas lia amiko : la kontrastaj karakteroj, ĉu ne... Lia malamo je virinoj korpigis en la riĉa edzino de iu nobelulo kies ĉefa merito estis, efektive, senoriginta blazono. Kiam ŝi paŝas en lia proksimeco — ŝiaj trajtoj pli rigidaj, pli sensentaj ol protokolo, ĉar ŝi konas lian kutimon — li sputas teren kaj laŭvoĉe pensas : « Por titolaĉo ŝi vendis sian karnon ; animon ŝi havis neniam ; nulo kaj nulo, li korekte adicias, estas nulo ». Estas lia vunda punkto...

Sed tial, vi protestas, kondamni ĉiujn virinojn estas ja ne laŭdinde. Mi samopiniás, sed Memim, « via » Memim... klopodu ŝanĝi lian kredon. Kvankam la psikologio asertas ke la bela sekso pli abundan posedas parolemon, povon pli konvikan ol la vira, vi certe ne sukcesos : ne estante fraziisto, nur tiujn li frekventas kies buŝoj malfermiĝas por diri koncizajn sencajojn.

Li lernis kelkajn lingvojn -- dum longaj libertempoj -- ; ankaŭ Esperanton, ĉar li estas inteligenta (lernu ĝin, fraŭlino). La vivo de Zamenhof, pro ŝia simpla, kompleta homeco, larmigis lin. « Iomete infana », via rideto mokas. Aliaj infanaĵoj, se vi volas : sin mem li ne indikas per sia nomo sed per « Memim » aŭ kiam li estas bonhumora per « Mem » ; neniam li uzas « vi », ĉiam « ci », pli intima, malpli banala precipe en Esperantujo.

Vi ŝajnas supozi ke mi imagas kvalitojn, fraŭlino, ke mi troigas. Ne, mi ne troigas. La vivo ne estas logika, jen la solvo de la proble-

mo. Liaj konversacioj estas interesplenaj, brilaj, originalaj. Ne mirinde cetere. Li doktorigis pri la Juro, kaj, kiam lia patro mortis, postlasante gravan heredajon — proksimume sep milionojn — li dubis kiel pasigi la tempon. Senskrupula skeptikulo, tiu « patro », tre frue vidvo — « mia edzino estis ege sprita adiaŭi la dolorvalon tre rapide » — misedukis la senteman Mem. Monerojn kolektadi, ekspluati la mallertulojn, ĝui la nunan momenton, instruis tiu moderna praktikulo. Tiaj lecionoj, kvankam allogaj, naŭzis Mem : por elsavi sin el tiuj materialistaj influoj li daŭrigis studi, sekvis kursojn pri filozofio kaj konkeris la diplomon de doktoro en tiu fako. Ne vanta pro la scienca manpleno kiun lia cerbo asimilis, li decidis forlasi la urbon ; tro da bruo, tro da farbitaj virinetoj, ne sufiĉa aero. Li venigis arĥitekton. Baldaŭ koketa konstruaĵo atendis lin en nekonata yilaĝeto. Maljuna kuiristino akompanis lin. Post kelkaj tagoj da suspekto, l'indigenoj akceptis lin kiel nedanĝeran fidindulon kaj baptis lin Simplaĉulo — den onnoozele.

Kviete tiam, li svingis sin en forgeson. Obstine. Por renesanco. La nomon, la animon, la sentaron kiujn lia patro, liaj studoj ĉizis, li penis deskuil. Kiel malnovan vestaĵon li provis deŝultrigi l'antaŭan ekzistadon. Sen indulgo li reknedis sian spiriton, sian koron ; li sekciis sin por analizi la difektojn de l' maŝino, malkaŝi l'idolojn parazitajn. Iom post iom, li disceligis la kontraŭajn fortojn, li disŝiris la maskon munduman, li forviŝis, li rektigis la deviajn liniojn de sia volo. Li luktadis, fortranĉis, sanigis. Li kreis...

Aspiroj ĉarmaj, pulsbato libera, vivĝojo naskiĝa. La veran plakon rivelis la batalo. L'idealo lia ne plu inerta. Ruĝa sango en la vejnoj. Regulare ritma la pulma movo. Gestoj naturaj, faroj sinceraj. La parolo, l'ago identaj... Venke eksonis voĉo, triumfe rediris eĥo : « Mem estas Mem ».

Jes, Mem estis Mem. Sed enigma li restis : lian profundan psikecaron oni ne deĉifris kaj lian pensiran fonon oni ne malkovris. Foje nuancriĉa kiel somera krepusko, foje elementa kiel arkego ĉiela, lia karaktero spitas, repuŝas fremdan enmikson. Tial tiuj mokinsultas lin ; tiuj ĉi, precipe la infanoj kaj la grandaĝuloj — la unuj ne deziras kompreni, l'aliaj ĉiam opinias sin komprenantaj — respektas lin. Kiel ŝnurdancisto, sola sur la streĉita drato de sia personeco, li marŝetas antaŭen. Kien ? Al la revaĵo kiun li bride hejmsopiris ĵarojn longajn, ĵarojn longajn... Sed unu rekte al ĝi, ne deflankiĝante al ĝi. Sed kia ? La respondo estas lia sekreto.

Vere mistere li kondutas. Iun tagon, dum vizito, mi trovis lin sidanta ĉe skribtablo. La brakoj krucumitaj. La fizionomio severa. La okuloj duonfermitaj. Senmova... Ĉu li preĝas... Ĉu li dormas... La silento ŝajnis vivi : eroj interparolaj svarmis, preskaŭ tuŝeblaj, tra la ĉambro... Subite, li kvazaŭ-vekiĝis kaj elvoĉis : « Amiko, neĝo falas pure senmakule ».

Ironie vi alrĝardas min. Ĉu ridinde ? Tiun momenton, mi eĉ ne pensis pri tio. Tiel neordinara estis la klimato. Komercan centron travojaĝinte, de frazoj amputitaj mi kunportis splitojn : diskutoj pri la krizo — delonge jam oficiala forĉasita ; pri militoj sangumantaj iaajn landojn ; pri domaĝaj sekvoj de sunumo ; pri borsaj kurzoj kapricaj ; pri butero iĝinta multekosta ; pri l'ekskvaloro de la belga

franko ; pri la Genevaj konvulsioj ; pri Shirley Temple kaj Harry Baur... Ĉio ekscesa, ekscitita, febra kiel la tramoj, la aŭtomobiloj preterhastantaj... Kaj nun trankvileco majesta ; tumulto paca de rezono saĝa ; viro kun mieno feliĉa ; vizaĝo pro beata kontento sulkiĝinta ; filozofo senzorga, simpatia... Kaj, mi estus ridinta !

Cetere, ĉu tiel sensignifa la citaĵo ? Kiam ni rakontas ion, ĉu ne estas ripeto anonima : io kiun ni ĉerpis el gazeto, kiun diris la najbaro aŭ dispartigis radistacio. Plagiato, jen nia potenco. Kopio, jen nia savo. Simiado unuanima kaj groteska... Tiel ne agis Mem. La formulo estas trovita de li. Lia eltrovo. La lia.

HO. Literoj haosaj, mi volus igi vin vortoj fidelaj, frazoj pasiaj, superfortaj por defendi, defendi...

Vagi ankaŭ komencas mi...

Stultuloj ambaŭ, ĉu ne fraŭlino. Vi pravas...

Adiaŭ do, fraŭlino. Alie...

Jes, pli bone : ĝis revido.

DISULO.

Gratuloj

AARSCHOT. — La simpatia membrino de « La Progreso », F-ino Maria Verbiest el Rillaar edziniĝis kun S-ro J. Van Edom. Al la juna paro ni deziras multe da feliĉo en ilia nova vivo.

GENT — Flandra Ligo Esperantista kore gratulas S-ron A. De Maertelaere, la kasisto de nia 7-a en Gent, pro lia sukceso en la Internacia Turista Konkurso de Italujo, en kiu li akiris la unuan premion en la Esperanta fako.

Ankaŭ la Genta grupo Roeland elkore gratulas.

Diversaĵoj



Na langdurige onderhandeligen om reden van zoek geraakte documenten, heeft de douane eindelijk — na vijf maanden — den voorraad nieuwe leerboeken losgelaten welke het Instituut te Budapest besteld had. Ten gevolge dezer laattijdige aflevering, is niet kunnen voldaan worden aan vele vragen om deze boeken.

Dit leerboek bevat 200 afbeeldingen, waaronder een aantal uit de bekende Adamson-reeks en is samengesteld volgens rechtstreeksche methode. Het wordt

portvrij toegestuurd, mits storting van 12 fr. op postrekening nr. 3268.51 van F.E.I. Bij afname van minstens 20 ekzemplaren, genieten de afdelingen en de vertegenwoordigers van F.L.E. een belangrijke korting.

* * *

Okaze de la 9-a Brazila kongreso de Esperanto, la Ministrejo por Eksterlandaj Aferoj ĉe la ŝtata presejo, eldonis grandan ilustritan gvidlibron pri Rio-de-Janeiro, ĉefurbo de Brazilo, alnomata « Mi-reginda Urbo ». Post trarigardo de la broŝuro, oni nur povas esprimi eĝan bedaŭron ke la distanco inter Eŭropo kaj Brazilo estas tiom granda kio kvazaŭ malebligas al ni efektiviĝi la deziron por vizito al regiono kies brileco, se ni povas kredi la verkiston Berilo Neves, eĉ superus tiun de la Paradizo.

* * *

KURSGVIDANTOJ atentu ! Ni helpas al vi dum la kurso kaj sendos donacon por viaj lernantoj. Skribu al K. Kalocsay, Hungarujo, Budapeŝt VIII. Mária-u 34.

* * *

RADIO-ELSENDADO DE OPERO « LA KISO » okazos la 7-an de oktobro (22.35-23.30 laŭ M.E.T.) per stacioj Brno, Praha I, Mor. Ostrava kaj Lyon P.T.T. La duakta opero estas de Bedriĥ Smetana en E-traduko de J. V. Samla. Por la unua fojo la E-horeto de Verda Stacio estos relasata per fremdlanda stacio (Lyon P.T.T.).

La arte eldonita radioalmanako de Verda Stacio, enhavante i. a. la fotojn de la ŝtatataj artistoj, estas havebla por kvar intern. respondkuponoj ĉe Radiojournal, Brno, Kounicova 44.

* * *

SCHRIFTELIJKE ESPERANTO-LEERGANG van de Esperanto-Propaganda Commissie te Nijmegen (adres voor Vlaanderen L. Calloens « Esperanto » Aalst O.-VI.). De cursus bestaat uit 26 lessen die wekelijks franco worden toegezonden en dan een week later voor de microfoon behandeld worden. De uitzending begint op 5 October te 18.20 u. langs Hilversum I (De cursus is echter ook heel goed te leeren zonder radio). Het totale cursusgeld bedraagt 65 fr. welk bedrag geheel of gedeeltelijk bij de aanmelding kan worden voldaan op postrekening Brussel 350.995 van H. De Lepper, Nijmegen (Ned.). Dadelijk na de aanmelding ontvangt men reeds de eerste les en verder alle berichten tot de 2-de les verschijnt. Zij die zich nu aanmelden, ontvangen als premie (zoolang de voorraad strekt), een portret van Dr Zamenhof (de meester van Esperanto) en tevens het Esperanto-lied. Reeds meer dan 10 jaren wordt door voornoemde commissie, met veel succes, een cursus verzorgd, ook in Vlaanderen hebben reeds velen met goed gevolg aan de leergangen van de « Centra Esperanto-Kurso » deelgenomen.

Gupra Vivo

AARSCHOT — LA PROGRESO.

Dum la somera sezono nia grupo ne ĉesis kunveni regule ĉiun vendredon en nia ejo. Antaŭ kvar monatoj ni disdonis al niaj membroj kaj ankaŭ sendis al aliaj grupoj nian somerprogramon. Unu-dugiĝis kvartagajn biciklajn ekskursojn ni faris. Tre sukcesa vojaĝo estis tiu al la samideanoj el Eindhoven ! Ili revizitis nin dum la granda Aarschota kermeso. La interamikiĝo estis granda ! La 12-an de Septembro ni reiras al Eindhoven kie « La Suda Kruco » ludas en

Esperanto « Jozef in Dothan », de Vondel. Kvinope ni trabiciklis la Granduklandon Luxemburg : bona okazo por vintra lumbild-parolado !

Sed ne nur al amuzo sed ankaŭ al laboro ni pensis. De la loka gazeto « De Klok » ni ricevis la permeson verki ĉiusemajne artikolon pri Esperanto. Ni jam faras multe da propagando por la du kursoj donotaj dum la vintro. Pere de la loka gazeto kaj de la disdonado kaj dissendado per la poŝto de centoj da cirkuleroj ni esperas atingi ne nur ĉiun enloĝanton de nia urbo sed ankaŭ la ĉirkaŭantajn vilaĝojn.

Ni faras gravan alvokon al ĉiuj niaj membroj : alportu almenaŭ du novulojn kaj ni havos por la nova jaro pli ol 60 membrojn.

ANTVERPENO — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Generale nia grupo estas diligenta : ĉi tiun monaton la Flandrema verŝajne rompis kiujn ajn rekordojn.

La dimanĉoj estis ĉiufoje plenigitaj : la 22-an al Diksmuide, partopreni la Flandran Pilgrimadon Pacan ; la tri sekvantajn dimanĉojn al Schooten, Heide-Bad ; fine la 18-an kaj la 19-an niaj Esperanto-Tagoj. Eĉ laŭ anekdota vidpunkto la ekskursoj al Schooten estis interesaj : tie la « infanoj » sin amuzis ege : dividitaj en du grupoj, permane batante kaŭĉukan pilketon, ili klopodis gajni terenon por atingi limon antaŭindikitan ; inter l'abioj, kies suprojn venteto fin-somera klinigas, la pilketo iren kaj returnen vojaĝas, la polvo nube ariĝas la entuziasmoj flagras foje tiuflanke, foje aliflanke... La lundon postan, la brakoj preskaŭ elartigitaj iomete doloras ; sed estas ja por Esperanto, ĉu ne. Bonhumori, senzorge ŝerci, kartludi, bani sin... eĉ kontraŭvole : oni ĵus fotografis la grupon padelantan ; kvin ŝipetoj veturis gracie sur la akvo kiam, subite, ino (kompreneble) pro movoj ankoraŭ klarigotaj, elekvilibrigis boateton kaj ĉio malaperis en la akvon ; mi eraras : ne ĉio, ĉar antaŭbrako ina (Kompreneble?) kun mano premanta la fotografilon superrestis la nivelon. Estis bela sceno kaj kiam de l' subakvigistoj la vizaĝoj montriĝis, rido multbuŝa, senkompata eksplodis : bedaŭrinde ja estis ke ili havis jam sian bankostumon...

La merkredajn kunsidojn ĉeestis denove multaj kaj vivplenaj anoj ; ni akceptis ĉefian kaj nederlandajn gesamideanojn. Kiel pruvo de nia progresemo, iniciato de F. Mortelmans estas nepre citinda. Originala viro, tiu Sus... Li rimarkis ke « Perfektiga Kurso » estis bezona precipe por ke spirito, klimato esperantaj rekreiĝu ; dum kelkaj tagoj li meditis kaj elpensis fine solvon — originalan kompreneble. De nun la merkredan kunvenon, membro prelegas fragmenton el « Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo-internacia » de Unuel ; tiam Sus komentarias tiun pecon de vere esperanta literaturo, substrekas gramatikajn notindaĵojn, atentigas je vortoj novaj, analizas la stilon kaj ĝin komparas kun aliaj aŭtoroj. La ekzerco daŭras duonhoron : ni lernas multe kaj tute ne enuas.

Sed la plej grava okazintaĵo restas niaj « Esperanto-Tagoj ». Okaze de la regiona kunveno ni havis efektive la plezuron akcepti ĉe ni, la 18-an kaj 19-an de septembro, rondon familian ; sed familio almenaŭ multida... Ĉu mirinde post ĉia la laboregado — feliĉe for — ?

Ni tamen ne bedaŭras nian penadon : la celon deziritan ni atingis kaj la planon antaŭfiksitan ni realigis : ĉu ne necesas ke, de tempo al tempo, multaj gesamideanoj montru al la eksteruloj ke lingvo internacia ekzistas, ke esperantisto ne estas fenomeno ? Ĉiuj niaj membroj sin dediĉis laŭeblece kaj estu dirite ke grupa vivo ne estis vorto sensenca ĉar ĉiu, kiel eble plej multe, kunhelpis tiamaniere ke niajn festadojn ilustru speciala, specife esperanta stampo. Ĉu niaj provoj, ne ŝparitaj, kondukis al sukceso, tion prijuĝu la ĉeestintoj. Entuziasmaj, multopaj (proksimume 100 ni kalkulis dum la vesperaj festadoj ; pli aŭ malpli 50 partoprenis la boatan viziton de la haveno) alcentrigis el ĉiuj direktoj. El Nederlando ni rekonis vizagojn el Bergen op Zoom Breda, Eindhoven, Terneuzen. Tiuj lastaj estis ege kuraĝaj : je la unua nokten ili forlasis nin por returni al sia urbo aŭtomobile : la saman dimanĉon ili devis partopreni alian esperantan okazaĵon tie. De multaj flandraj regionoj ĉeestis fervoraj geamikoj : Arendonk, Aalst, Geel, Gent, Mariaburg, Roeselare; Ronse; Turnhout kaj la antaŭurboj de Antverpeno estis reprezentataj ; kaj eble mi forgesas ankoraŭ citi la duonon...

Je la oka dum la sabata vespero, la salonego en la hotelo « De Ton » estis jam plenplena ; kun iomete da prokrasto, kiel decas cetere en Antverpeno, je la sonoj de la « Espero » starante kun-kantita, la festadoj komencis. S-on Vermuyten, kun talento kaj sentemo delikataj, deklamis du poemojn : unu el la flandra esperantlingve, alia el la esperanta flandralingve. S-ro Bolleyn, bonega tenoro interpretis multe aplaŭdite kantojn de E. de Curtis. Sekve la mandolinorĥestro « Risoluto » (30 ekzekutantoj... nur) prezentis muzikaĵojn de F. Jullian kaj de Gounod : ankaŭ ĝi rikoltis meritan sukceson. Sekve, por ion diri pri najtingaloj, S-ino Spiessens, ricevis la kantvicon : « Mi amas vin » de Edv. Grieg, « De bloemen en de sterren » de Lod. Mortelmans ĉiuj aŭskultis en silento religia kaj kiam florfasko estis prezentita al ŝi en la nomo de la grupo neniu bedaŭris ge ŝi faris al ni la honoron kanti alian flandran melodion. Paŭzo permesis al ĉiuj ripozi post tiu muzika kaj kanta « antologio » : ne al ĉiuj ĉar intertempe la aktoroj de la « Flandrema » estis kolorŝmiritaj por ludi « Flandra lingvo sen profesoro » de Tr. Bernard. Tiu unuaktaĵo lernita en tempospaco rekorda kaj kvankam ludita de aktoraro improvizita ridigis ĉiujn kaj laŭ l'opinio de kompetentuloj indis laŭdon. Tiam komenĉigis por multaj — mi volas diri la dancemulojn la ĉefa plezuro : je la sonoj de ĝazbando la piedoj ekmoviĝis, ŝoviĝis antaŭen, malantaŭen, dekstren, maldekstren : sufiĉe por ekkaptturniĝi... Sed tion ili ne priatentis la pasiaj amikoj de la Muzo Terpsihoro... ; pasiaj kaj nelacigeblaj : ... la gajeman prezidanton de la Gela grupo oni precipe rimarkis. Kiam post la 2-a, pro severaj polireguloj, la balo haltis, neniu ŝajnis eldancita, sed kiel bonaj servantoj de la Ŝtato, ni obeas... Kaj ĉiu iris liton por almenaŭ dormi kelkajn horojn ĉar ne estis finite. La dimanĉon, je la 9-a kaj duono, unua grupo foriris por viziti la Tunelcentralon kaj la Turan Kontraŭaĵon ; dua grupo foriris iomete pli malfrue. En la Aerumcentralo, ni plej admiris la « Kontrolĉambron » : tie ĉio kio okazas en la Tunelo estas precize notata kaj oni povas ankaŭ agi taj por antaŭrimedi kion ajn kiu povus malbone funkcii ; ĉio estas

meĥanika kaj verŝajne mirindaĵo de la teĥniko : ĉu vi foje volas scii kiom da aŭtomobiloj, en tiu preciza sekundo, trapasas la tunelon ? Rigardo al iu kvadranto : « 5 rulas al la dekstra bordo, kvar al la maldekstra ». Nekredeble. Post la tagmanĝo, ĉiuj kunvenis je la Flosponto por foriri je la 2-a kaj traveturi sur la Ŝheldo la havenon : escepte la naturajn kaj havenajn belajojn ni ĝuis plian allogaĵon : la gvidanto kiu posedas voĉon pli romantikan, pli melanĥolian ol fantomaro ; tamen li estis praktika : li ne forgesis peti trinkomonon (devas esti ebriulo progesia, sendube). Post tiu interesa vojaĝo, ni kunvenis lastfoje en nia ejo : ĉiu grupo, ĉiu fremdurbano faris mallongan paroladeton kaj nia Prezidanto dankis ĉiujn. Kaj oni adiaŭis. Ne por longan tempon, ĉu ne, ĝeamikoj.

Ĝis la... nederlandaj samideanoj.

Ĝis la... flandraj amikoj.

BRUSSEL — N.E.L.E.

Met September werden onze wekelijksche vergaderingen hernoemen. De verlofdagen zijn voorbij, wij zetten onze winterwerking in, bijgevolg: alle hens aan dek !

Door het provinciebestuur werd onze afdeling voor 'n paar maanden uitgenoodigd deel te nemen aan de kostelooze boekenuitreiking. Dit is de vierde maal dat we het genoegen smaken onze afdelingsbibliotheek met Esperanto-werken voor een bedrag van 225 fr. te verrijken. Ditmaal viel onze keuze op : « Fundamento de E. » (kvintlingva), « Fundamenta Krestomatio », « Romano de San Michele », « La Homaj Rasoj de la Mondo », « Kandid », « Muusses E-biblioteko » (kompleta) en daarbij nog een aantal uitstekende studieboekjes. Onze bibliotheek telt nu over de 100 werken en biedt lectuur naar ieders gading, legemuloj maakt er gebruik van, aangename en nuttige winteravonden wachten u !

DEINZE ESPERANTO KLUBO.

Unu jaro pasis depost la Nederlanda Ĉseh-profesoro Henk Thien donis nin sian provlecionon, propaganditan de S-ro Vanderlinden, instruisto en Astene. De la multaj aŭdintoj, ĉirkaŭ 30 enskribigis sin por la Esp-kurso. La urbeŝtraro afable permesis, organizi la lecionojn en la urblernejo. La alloge donita kurso estis regule partoprenata.

Post la 20 lecionoj, la lernantoj starigis nian Esp-klubon ; la kotizoj servis por aboni dekon da Esp-revuoj (ĉirkaŭ-irantaj inter la membroj), kaj fondi biblioteketon. Ni adiaŭis nian ŝatatan profesoron en ĝoja festmanĝada kunveno kaj granda balo. La reston de la vintro ni utiligis per ekzercado kaj ripetado. Dum la Somero ni havis kelkajn letervesperojn.

En Oktobro, nia aktiva klubprezidanto, Moric Vanderlinden, komencos novan Esp-kurson en la nova ejo de urba desegnakademio. Tiun kurson ni propagandas per granda disvendado de la broŝuro : *Waarom Esperanto?*

GENT — ROELAND.

Post la aŭgusta libertempo la geanoj de la juna grupo regule kunvenas ek de septembro, ĉiu sabate de la 7 1/2-a ĝis la 9-a en Elcker-

lyk, Korte Kruisstraat, 3. Krom la perfektigado en la uzo de la lingvo, la geanoj multe ĝuas la agrablan kuneston kaj priparolas la propagandon por la estonta kurso.

KORTEMARK — Eta semo povas kreski.

Post la kurso en Aprilo la finfesteto de la 9-a de Majo, ni kunvenis regule ĉiun merkredovesperon. Intimeco kaj studemo karakterizas niajn kunvenojn. Nia sekcio konsistas el dekunu lernemaj geanoj kiuj laboras por ke « eta semo povu kreski ».

KORTRIJK — ESPERANTISTA GRUPO.



Dum la monato decembro venonte, la « Esperantista Grupo Kortrijk » rememoros la 10-jaran datrevenon de sia fondiĝo.

Sabate, 17-12-1927, okazis la unua kunveno, dum kiu estis decidite grupigi la izolajn esperantistojn kaj fondi grupon.

La 5-an de januaro 1928 estis aprobitaj la statutoj kaj elektita la komitato. Je tiu dato la grupo jam nombris 19 membrojn, rajtantaj laŭ art. 3 de la statutoj je la titolo « membro fondinto ». El ili restas fidelaj ĝis nun : Mattelaer Pierre, Bossuyt Roger kaj Debrouwere Gerard.

La juna grupo tuj fariĝis agema. Kurso malfermiĝis kies sukceso estis tiel granda (250 gelernantoj) ke necesis ĝin splitigi. La grupo proporcie prosperis kaj la 27-4-1928 atingis 75 gemembrojn, kiun nombron kelkaj monatoj poste superis la centon.

Je Pentekosto 1932 la grupo organizis la 3-an kongreson de Flandra Ligo, por kiu la urbestro donis 4.000 frankojn da subvencio.

La ekonomie krizaj jaroj malbone influis la grupan vivon ; malnovaj membroj foriris kaj ne estis anstataŭataj per novaj ; ĉiuj klopodoj por revigligi la asocion restis senfruktaj, ĝis ni riskis pasintjare la kurserion de la nederlandano Henk Thien kaj poste tiun de la Ĉeĥoslovako Karlo Šolc, kiuj rekondukis nin ree al la prospero kaj per la membrocifero 65 metas nin je la kapo de la sekcioj.

En aŭgusto 1937, la grupo malfermis standon en la komerca foiro, sub devizo : « Esperanto en Komerc kaj Turismo », kiu renkontis grandan sukceson. Dum la solena inaŭguro, la estraro de Flandra Ligo, kiu komplete ĉeestis, estis prezentita al la urbestro Mayeur, la deputitoj De Jaegere kaj Coussens kaj aliaj eminentuloj ; laŭtparoliloj ludis niajn himnojn : « La Espero » kaj « La Tagiĝo », tiel ke fariĝis impona esperantista manifestacio.

La vivo de la grupo sin respegulas ankaŭ en la korespondaj rilatoj de la gemembroj kun la eksterlando, rilatoj el kiuj rezultis dum la pasinta monato vizitoj al la grupo de nederlanda korespondantino, 2 danaj korespondantoj kaj 1 korespondanto el Madagascaro.

Ni baldaŭ eniros novan 10-jaran periodon, ni esperu ke ĝi estu almenaŭ tiom fruktedona ol la unua kaj ke multaj membroj restos fidelaj ĝis ĝia fino !

MECHELEN — LA ESTONTO.

Ek de Septembro ni denove kaj regule kunvenas Vendredon en la hejmo de nia prezidanto Hombeeksche steenweg, 54.

Estas nepre necesa ke ĉiuj niaj membroj ĉeestas. Ankaŭ por la E. movado estas vereco : « La kredo sen la ago estas morta kredo ». Nun ke la Flandra Ligo tiel bone evoluas ĉiuloke, la vigla Mehlena grupo denove plenkuraĝe devas rekomenci la laboron.

RONSE — LA PACA STELO.

Decidita ; la Cseh-Kurso komencos la 12-an de Oktobro kaj ni ĉiuj laborados por akiri belan rezultaton.

Jam de kelkaj semajnoj regule aperis en la lokaj ĵurnaloj artikoloj favore al nia Zamenhof lingvo. Ankaŭ tre metode ni propagandis per afiŝetoj pendantaj ĉiujn antaŭ la montrofenestroj de nia grupano kaj ankaŭ antaŭ la fenestroj de privataj domoj.

Oficialaj afiŝo sekvas kaj flugfolioj estas disdonotaj per niaj fervoraj propagandistoj.

En tiu-ĉi monato ni ankaŭ duobligos nian laboron por ke ni estu fieraj pri nia agado, propagando kaj ankaŭ por nia Ĉeĥa profesoro kiu meritas amason da novaj elementoj. La grupo de Ronse ankaŭ sin okupas por okazigi tutnovan kernon sub formo de Kurso en Sottegem kaj Nederbrakel.

Pacaj Gestelanoj ! Ni ne tro babilu, sed konsciencie ni laboru, precipe nun ; la lastaj tagoj alproksimiĝas. Ĉiuj senescepte, varbu ankoraŭ UNU elementon, kaj respektu kaj memoru la nuran devizon : 50 membrojn en la kurso.

WETTEREN — PERSISTO.

Ankaŭ al Wetteren F. L. E. trovis la vojon. La provlecionon ĉeestis ± 150 personoj, ĝi okazis la 2-an de Aprilo en salono de la urbodomo. Sekvis la kurson de profesoro Thien 89 personoj, ĝi estis la plej bone sukcesinta kurso el la tuta kursserio de F.L.E.!

Post la fino de perfektiga kurso kaj sukcesinta finfesto, kelkaj aktivuloj decidis starigi sekcion de F. L. E. en Wetteren. Sekve al iliaj klopodoj fondiĝis « Persisto » kiu nun nombras 16 anojn. Ni klopodos varbi la ceterajn lernintojn por nia juna organizajo. La sekcistraro prizorgas interesajn vesperojn kaj ekskursojn. Per harmonia kunlaboro sekcio Wetteren kreskos kaj prosperos !

Angulo de la Sercemuloj

GRAVA SCIIGO.

OKAZE DE LA CENTA APERADO DE NIA REVUO, NI KONSTRUIS KRUCVORTON POR LA PLEJ BONAJ ESPERANTISTOJ. NI FORLOTOS KIEL PREMION « LA PLENA VORTARO DE « VAN STRAATEN », JE VALORO DE 37,50 FR. ! SE NENIU SUKCESAS SOLVI LA TUTAN ENIGMON, LA PREMION GAJNOS TIU, KIU TROVIS LA PLEJ MULTON DE LA SERCOTAJ VORTOJ. SE PLI OL UNU TAMEN SUKCESAS SOLVI ĜIN ENTUTE, NI FORLOTOS

LA VORTARON, KAJ LA NEGAJNANTOJ RICEVOS KONSOL-
PREMION .POR LA ALIAJ PROBLEMOJ NI KIEL KUTIME FOR-
LOTOS UNU PREMION POR ĈIA PROBLEMO.

La solvoj estu sendataj antaŭ la 15-a de Novembro, rekte al S-ro
VOLDERS, Bredastraat, 94, Antwerpen. La difinoj kun (R) estas
radikvortoj.


PROBLEMO 35 KRUCVORTO. (100 Poentoj)

HORIZONTALE :

- 1) Distanco inter la celita kaj trafita punkto (R). — Brando.
- 2) Marko farita per frapo (R). — Konstruaĵo (R). — Denta sub-
stanco. (adj.).
- 3) Marasmo (R). — Solida. — Provizi ŝipon per ĉiuj necesaj iloj.
- 4) Portebla loĝejo (R). — Interna korpparto (R). Korpparto (R).
— Interna korpparto (R).
- 5) Okaze aŭ serĉante renkonti ion (R). — Perua remaĉulo (R). —
Kapparto (R). — Forlasi ian lokon (R).
- 6) Numeralo. — Inter krampoj. — Folio (R). — Konjunkcio. —
Supra estaĵo (R).
- 7) Oscedi. — riverego. (Hispana lingvo) — Muzika teatraĵo (R).
- 8) Sangarangō de la literoj de vorto por formi alian vorton (R). —
Oceano (R).
- 9) Rabobirdo. — manĝaĵo. — Juna homo (R).
- 10) Prefikso. — Radio ondo. — Kapparto. — sufikso. — Lokdifino.
- 11) Marfiŝo. — marŝo. — tri literoj el dormado. — enuiga.
- 12) Preni ion por atingi celon. — Vergeto kun metala pinto por
pafi (R). — Taŭga (R). — preciza (R).
- 13) Stampita signo (R). — Subtera loko (R). La hommanĝuloj (R).
- 14) Teksilo (R) — vivnecesaĵo (R). — amato (R).
- 15) Radparto. — Stopilo (R).

VERTIKALE :

- 1) Teatra ludisto (R). — Fremda reĝo (R).
- 2) Elektra fajrero (R). — Konstruaĵo por publika amuzado (R).
- 3) Domparto. — Tri sinsekvaj literoj el « benado ». Remparoj (R).
- 4) Dombesto (R). — Acidigita vino. — Unua virino.
- 5) Kamarado (R). — Ronda militilo. — Glitveturilo (R).
- 6) Reĝa palaco. — konjunkcio. — Marŝo. — ĉiopova estaĵo (R).
- 7) Bati (R). — Trinka diboĉo (R).
- 8) Muziknoto. — Malmola porulebla kalkŝtono. — Nacia arto.
- 9) Manĝilo (R). — Sincere respektoplena al Dio (R). — Ekkrio. —
Objekto (R).
- 10) Modera tarifo. — Reĝnomo (R). — Atomo (R).
- 11) Havigi al si (R). — Mallumeto (R).
- 12) Muziknoto. sufikso. O.C.K. Muziknoto. Katolika asocio.
- 13) Insekto (R). Kredi ke io estas ia (R). kvar literoj el « nomaro ».
- 14) Bakaĵo (R). — granda besto (R). — senŝeligita grajno (R).
- 15) Birdo (R). — Frukto (simila al groso) (R). — Enpaki (R).
- 16) Punkto kie la tero estas plej proksime aŭ plej malproksime de
la suno (R). — Ideo pri perfekteco (R).
- 17) Ĥemia elemento (metalo) — Konstruo por ludi spektaklon (R).



PROBLEMO 36. DIVIDO (10 Poentoj)

La demando estas solvi tiun dividon kaj ŝanĝi la literojn per ciferoj. Poste serĉi la vorton kiun oni formas per la literoj

0 1 2 3 4 5 6 7 8 9

```

Z . . . N . H . / F F O
R F F           Z M A R E
M . . .
A F F .
-----
A . . .
Z F F .
-----
. . . .
F F .
-----
. . . .
. F F D

```

PROBLEMO 37. VORTSERĈADO.

Formu per la literoj de la nomo de nia prezidanto, « RAINSON » kiel eble plej multe da vortoj. Ekzemple : RANO-SINO-RASO k.t.p. sed ne sana-roso-anaro, k.t.p. Ankaŭ ne formu, propajn aŭ geografiajn nomojn. Tiu-ĉi problemo ne kunkalkulas por la jarbatalo.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Adolf De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, 22, Hamme (O. Vl.).
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap: 5 fr.; met maandblad: 25 fr.
Postчек: Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50

AFDEELINGEN:

Aalst: « Pioniro ». Sekretariaat: Molenstraat, 30.
Aarschot: « La Progreso ». Sekretariaat: Fabriekstraat, 28.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esp-ista ». Sekr.: Stefaniestraat, 44.
Anzegem: « La Juna Espero ». Sekretariaat: Statiestraat, 38.
Arendonk: « La Verda Kampina Stelo ». Sekretariaat: Schotelven, 4.
Blankenberge: « Norda Stelo ». Sekretariaat: Koninginnelaan, 18.
Brugge: « Paco kaj Justeco ». Sekretariaat: Guido Gezellelaan, 15.
Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. Van Humbeekstr., 3
Deinze: « Deinza Esperanto-Klubo » (D.E.K.). Sekretariaat: Dorp, 54, Astene.
Diksmuide: « Grupo Zamenhof ». Sekretariaat: Maria Doolaegheststraat, 36.
Gent: « Roeland ». Sekretariaat: Raapstraat, 82.
Kortemark: « Eta semo povas kreski ». Sekretariaat: Statiestraat, 23.
Kortrijk: « Esperantista Grupo ». Sekretariaat: Moeskroenstraat, 11.
Lebbeke: « Vasta Horizonte ». Sekretariaat, Stationstraat, 87.
Leuven: « La Nova Tagiĝo ». Sekretariaat: Broekstraat, 21, Heverlee.
Lichtervelde: « La Tagiĝo ». Sekretariaat: Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto ». Sekretariaat: Vekestraat, 25.
Oostende: « Ostenda Grupo Esp-tista ». Sekr.: G. Decler. Torhoutsche stw. 150.
Oudenaarde: « Al Paco ». Sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: « Ruselara Esperantista Grupo ». Sekr.: Hoogledesteeweg, 163-165.
Staden: « Nia Grupeto ». Sekr.: (M. Vandamme). Vijfwegen.
Tienen: « Zamenhofa Standardo ». Sekretariaat: Bruulstraat, Kumptich.
Torhout: « La Verda Stelo ». Sekretariaat: Boomgaardstraat, 4.
Vichte: « La Frateco ». Sekretariaat: Harelbekestraat, 29-a.
Vilvoorde: « La Verda Stelo ». Sekretariaat: Marius Duchéstraat, 45.
Wervik: « Fratiĝo ». Sekretariaat: Brugstraat, 9.
Wetteren: « Persisto ». Sekretariaat: Eesvelde, 119, Kalken.
Wevelgem: « Per Esperanto al Mondpaco ». Sekr.: Papenstraat, 54.
Woumen: « Veni, Vidi, Venki » (V.V.V.). Sekretariaat: (Rom. Vandepoele).
Zaventem: « Verda Standardo », Sekretariaat: Heldenplaats, 115.
Zwevegem: « Paco per Esperanto ». Sekretariaat: Ootegemstraat, 71.

VERTEGENWOORDIGERS:

Assche (Brab.): L. De Rop, Tenberg, 24.
Hamme (Vl.): G. Lenaers, Willemstraat, 22.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.
Mol: L. Claeys, Kapellestraat, 3.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: G. De Boes, Wijnstraat, 81.
Sint-Truiden: G. Mathijs, Steenweg op Hasselt, 55.
Tielt: R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.

Flandraj Esperantistoj, via organizo estas:

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA !

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

DRUKKERIJ

★ Aŭtomata Presejo
H. BRAEKEVELT

Statiedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandra provincoj.

Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.

Liveras al la diversoj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.

Tel.: 1080.



Proksime de la naĝejo (200 m.).

« Presejo Groote Centrale Drukkerijen », Lange Loza nastraat, 181, Antwerpen.

“BREUGHEL”

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

■
Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

LUOTA

Café “Nieuwe Carnot”

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen

■
Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj

manĝaĵoj — Bonega servado.

■
Ejo de Flandrema Grupo

ST MARIABURG

10 KM. DE ANTVERPENO

Grand Hotel de la Chapelle

lokita en arbarĉirkaŭaĵo
ĉia moderna komforto — aŭtomobilejo
laŭteniso — infanludejo — teraso

Restoracio — Familia pensio

N.B. - Elektita loko por ekskursaj celoj
Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

Wwe VAN HAVER-DE BOES